

El prelego prezentita en Grésillon

KIO ESTAS ALERGIO ?

De kelkaj jaroj, la vorto « alergia » fariĝis pli kaj pli ofte uzata. Alergio fariĝis laŭmoda malsano, kaj oni rilatigas ĝin al io ajn, de pentraĵo al... « je je » kantoj. Tamen en sia komuna formo, kiel en sia propra kaj vere medicina signifo, la vorto « alergia » konservis neŝanĝitan karakteron, la ideon de reago fortega kontraŭ io.

Kion do signifas tiu vorto ? Se ni rememoras la etimologion, la devenon de la vorto, ni konstatas, ke ĝi devenas de grekaj vortoj, kies signifo estas : « ago alia », alia, ol tiu, kiun oni normale povas atendi.

Klinikaj manifestacioj de alergia, same kiel astmo, « fojna » nazkataro, jukinflamo, ekzemo, k.a. estis konataj jam antaŭ longa tempo, sed ties mekanismo ĝis la komenco de ĉi tiu jarcento restis tute nekonata.

Du Britoj, Salter kaj Blackley, estis la pioniroj. Salter suferis pro astmo, kiam li kontaktis sian katon. Li rimarkis, ke, fronte la felon de la besto sur sia haŭto, li kaŭzis erupcion. Siaflanke Blackley, kiu suferis pro fojna nazkataro, notis, ke poleno frotita sur lia haŭto kaŭzis viglan lokan reakcion. En 1902, Richet kaj Portier injekciis, subhaŭte, al hundo, unu kuban centimetron da ekstraktaĵo el palpiloj de mara besto nomita « mara anemono ». La hundo neniel reagis... Tri semajnojn poste, la sama hundo denove ricevis saman injekcion, kaj mortis post 25 minutoj, montrante tiun fenomenon, kiun oni nomas nun « ŝoko » aŭ « kolizio ». La eksperimentistoj atendis kontraŭan rezulton, ĉar estis tiam la fama epoko de vakcina imuneco, sekve de la verkoj de Pasteur kaj ties disĉiploj. Pro tiu ne atendita rezulto, Richet kaj Portier kreis la vorton « anafilakso », formitan per du grekaj vortoj signifantan : « kontraŭ » kaj « ŝir-

mado ». Anafilakso estas la kontraŭo de imuneco.

Oni tre rapide komprenis, ke anafilakso ne estas neordinara fakto, kaj ke tute ne venigaj substancoj, same kiel ĉevalserumo, povis kaŭzi tiun anafilaksan kolizion. Kvar jarojn post la eksperimentoj de Richet kaj Portier, en 1906, von Pirquet konstatis, ke malsanulo pri tuberkulozo aŭ eksmalsanulo reagis kontraŭ tuberkulino (substanco ekstraktita el kulturaĵo de Koch-aj baciloj) tute ne same kiel nemalsanulo. Estis trovita la principo de kutireakcio (haŭtreakcio), kiu nun estas ĉiutage uzata, kiel diagnoza rimedo. Von Pirquet kreis la vorton alergia.

En 1911, amerikaj sciencistoj efektivigis la unuajn haŭtajn testojn, kiuj ebligis observi reakciojn kontraŭ diversaj substancoj : poleno, por uloj suferantaj pro fojna nazkataro, ĉeval-haŭtskvamoj por tiuj, kiuj suferas pro astmo kiam ili alproksimiĝas al ĉevaloj (tio estas sufiĉe ofta), ova blankaĵo por tiuj, kiuj suferas pro urtikario, kun krizoj aperantaj, kiam ili manĝis ovojn. Oni diris, ke tiaj homoj estas sentemegaj aŭ alergiaj kontraŭ tiuj substancoj. Tiamaniere oni povis pensi pri alergiaj malsanoj.

Post tiu mallonga kaj certe ne kompleta historio de alergia, ni nun povas diri, ke alergia estas « alia reago », troega respondo al kontakto de ekstera substanco, kiu ĉe normala (nealergia) homo, kaŭzas neniun perturbon, neniun malnormalaĵon. Nun ni rapide studos la mekanismon de alergiaj okazaĵoj. Ni indikos la ĉefajn alergiigajn substancojn. De la difino mem de alergia venas kelkaj karakteroj :

neceso de antaŭa kontakto de organismo kun alergiigo ;
alia reago, ĉar ĝi estas alia ol tiu kiu okazis je la unua kontakto ;